



FN PER ANK 47

Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

Nº 37a (nova serio) - Nº 122a - Septembro 1976

Prizorgas: Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN .

Eldonita de: la ESPERANTO - Grupoj de la Ruena Regiono .

Sendu la manuskriptojn antaŭ la: 10a de februaro - 10a de majo -
10a de aŭgusto - 10a de novembro -

UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE: c.c.p. : ROUEN 283 40 H .

Kotizoj: Por 1976 : Minimuma kotizo : 5,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 5,00 Fr.

"Le vermentes manuscrits pri la enhavo de la suskribitaj artikoloj"

ION PRI LA LEĜOPROPONO ...

"Specialistoj studis la problemon por prepari leĝproponon. Ĉu modeste peti ? Kia estus la plej bona aĝo ? Kiomaniere instrui ? Estis decidite, ke la plej bona aĝo por lerni nian lingvon estas inter la 12a ĝis la 16a jaro : ke ne devas esti deviga lernado, ĉar ĝi certe fiaskus, sed libervola, same kiel oni instruas en Francujo diversajn provincajn lingvojn. Sur tiuj bazoj la komisiono faris leĝproponon, kaj jen estas la unua artikolo :

'La lernado de la Internacia Lingvo nomita Esperanto estas akceptata kiel fakultativa lernejobjekto en la programoj de la duagrada instruado.'

Num jen estas la 5a artikolo :

'Por la instruado kaj por la ekzamenoj la kandidatoj profitos el la samaj rimedoj kaj el la samaj avantaĝoj konsentitaj al tiuj, kiuj lernas fremdajn lingvojn.'

Num venis delikata decido : kiomaniere ataki ? Kiuj estas niaj plej bonaj advokatoj ? - estas riskoj en la elekto de politika partio.

Unue Sro ROUGET, kiu jam rilatis kun la sekretario de la konservativa partio, prezentis al li la projekton. Li akceptis kaj sendis cirkuleron al la 176 deputitoj de sia grupo. Do la plej grava, ĉar estas 490 deputitoj en nia parlamento. Bedaŭrinde postlonga atendado ni ne havis reagojn pri la efiko de tiu cirkulero.

Poste la afero stagnis, ĝis kiam ni ricevis heredaĵon de samideano, kiu permesis eldoni propagand-broŝuron kaj sendi ĝin al ĉiuj deputitoj. Tiam estis favoraj reagoj ĉefe de la socialistoj, kaj tiu grupo voĉdonis favore por nia leĝpropono. Do subite ni havis 107 deputitojn pretajn voĉdoni. Dinamike ni mobilizis niajn fortojn por havi maksimuman ŝancon de sukceso, kaj nia honora prezidento Sro René LLECH WALTER pagis la elspezojn por reeldono de la broŝuro kun alfono de la leĝpropono kaj kun komentoj. Li ankaŭ pagis por la sendo de la broŝuro al parlamentanoj : deputitoj kaj senatanoj, kaj kompreneble al ĉiuj politikaj estroj. Proksimume 800 sendoj.

Sentante nia estraro trovis necesan alvoki al ĉiuj francaj sindikatoj, por ke ili rilatu

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais . DEPOT LEGAL : 3e Trimestre 1976

Le gérant : P. LEMARCHAND.

.../...

kun siaj lokaj deputitoj, ĉu skribe, ĉu parole. Vere estis unuanima akordo, ĉu de SAT- Amikaro, de la fervojistoj, de la laborista, katolika, protestanta asocioj, kaj de izoluloj. Ni ricevis multajn leterojn de la parlamentanoj kaj jen estas la ciferoj pri la rezulto :

1. Konservativa partio, nur 62 favoraj kaj 2 malfavoraj.
2. Ni ricevis konfirmojn de la socialistoj por 107 voĉoj.
3. Fine 48 voĉoj de diversaj grupoj, inter ili 12 komunistoj el grupo de 74 membroj. Tio estas sukceso. Ĉar antaŭe la komunistoj respondis al niaj petoj, ke nur la grupo povas respondi al niaj demandoj.

Do entute ni havas 217 favorajn voĉojn. Sro ROUGETET opinias, ke nun ni havas la kvorumon. Tamen atinge la oficialigon de tiu propono jam estas bela realigo per si mem. Jam la leĝpropono estas faktoro, kiu seriozigas niajn fortulojn kaj donas rezon kaj konsideron al niaj argumentoj apud certaj personoj.

La unua paŝo estas farita kaj ni povas fieri - sed modeste, ĉar tio ne sufiĉas. Unue, ĉar leĝpropono ja restas, laŭ sia nomo, nur efektiva diskuto de la propono, ĉia oficiala akcepto de la 2 ĉambroj, kaj faka adlikado.

Fine kia estas nun la situacio ? Sro ROUGETET ricevis promeson de amaro de nia ĉefministro kaj anrobon de la prezidantoj de la ĉambroj de deputitoj kaj senatanoj. Bedaŭrinde la komisiono kiu devas studi nian proponon, estas trese okupata. Oni diris al ni, ke estas 2000 leĝproponoj kiuj atendadas. Kaj ni konstatis, ke oni diskutas kaj akceptas gravajn leĝojn malgraŭ multaj diskutoj kiuj prenas multe da tempo.

Konklude mi povas diri, ke neniam la cirkonstancoj estis pli favoraj al ni por oficialigo de nia lingvo. Senlaca laboro meritis repagi nin. Tiam, kiam la grandaj pordoj de la lernejoj oficiale malfermiĝos al ni, Esperanto povos profiti sian venkon.

Fine, mi kredas ke oni devas danki niajn italajn samideanojn, kiuj ankoraŭ klopodis ĉe la parlamento; Laŭ la direktoro de la kabineto de nia ministro de edukado, estus necese ke plura landoj farus samtempe decidon favore al la instruado de Esperanto en la lernejoj. Restas la demando, ĉu aliaj landoj povas imiti nin ? "

Citaĵoj el la parolado pri la franca leĝpropono, kiun Sro GUILLAUME prezentis dum la 6a Kongreso de U.E.A. en Ateno Ĉismere.

El "ESPERANTO - KURIERO PARLAMENTA", parlamenta novaĵletero de U.E.A. n°4/1976.

Redaktas : Sro DAVID R. CURTIS, 7St. Judes Terrace, Weston super Mare, AVON, BRITUJO, BS22 8HB.

Subtenu per informoj kaj mallongaj artikoloj tiu interesplena informfolio !

PROTOKOLOJ

Estrarkunveno en LISIEUX 25/9/76a

La estraro de U.N.E. kunvenis en la JUNULDOMO de LISIEUX la 25 an de septembro 76a ek de la 14a horo. Ĉeestis la kunvenon : Sroj QUILLAUD, GIBAUD, POTTIER, LEMARCHAND, estraranoj, kaj pluraj Esperantistoj el Sud-Normandio, inter aliaj Sroj MARTIN, LELOGEAIS kaj ROUSSEAU. Senkulpiĝis Sino RAVET Sroj JOURIS kaj LEGRET.

MALFERMO : Sro QUILLAUD malfermis la kunvenon dirante, ke estas por ni ĝojo retroviĝi en Sud Normandio. Li dankas al ĉiuj ĉeestantoj.

KONGRESOJ kaj RENKONTIĜOJ : Sro QUILLAUD vizitis korespondantojn en Rijeka. Sro LELOGEAIS partoprenis la SAT Kongreson en GOTTENBURGO. La kongreso estis pli vigla ol pasintjare, sed la kultura flanko malpli riĉa laŭ li.

Du Hungarinoj vizitis Gesoj LOISEL en Rouen

La vizito de la Angloj al LE HAVRE ne okazis pro danĝero de ŝipstrikto. Oni devis lastmomente nuligi ĉion.

Sro VAN HULST el Nederlando vizitis Sron LEMEUR dum septembro.

ADRESARO : Sro CARRE edziĝis kun Leningradano kaj nun loĝas en Rouen. Sino DEVERRE, Abato FOLLIN, kaj Fino ROBIN forgesis informi nin pri sia nova adreso.

KASO : 1640 fr troviĝis en ni la 22an de junio ĉiuj rekontiĝoj alportis profiton.

Estrara Kunsido de U.N.E.

La grupo de SOTTEVILLE/ROUEN ne plu funkcias sed posedas en sia poŝtĉekkonto 431 fr. Ni klopodas akiri tiun sumon.

LEĜPROPOZO : 10 deputitoj respondis al niaj leteroj. Eble aliaj respondis al U.P.E. kaj SAT Amikaro, sed ni ankoraŭ ne ricevis informojn pri tio. Laŭ Sro MARTIN, Sro BISSON el Lisieux estas favora.

.../...

VENONTA KONGRESO : Sro QUILLAUD skribis al Sro LEBEN pri eventuala renkontiĝo en LUTRY por ricevi la adreson de la respondeculo de la tiea Somerumejo. Sro MARTIN ankaŭ proponas Manoir des Parcs, apud Lisieux, kaj Sino LEMOIRE proponas Maison Parisi isle en Bréville apud CABOURG.

ZAMENHOFA RENKONTIĜO : Ĝi okazos la 11an kaj 12an de decembro 76a en la Junulgastejo en ROUEN. Sro QUILLAUD skribis al la direktorino por rezervi la lokon. Sro LEMARCHAND skribis al la Franca Fako de T.E.J.O. por komuna renkontiĝo dua la Zamenhofa Kunveno. Krone la Havra grupo preparas distraĵojn; Sro ROUSSEAU provas prezenti diapozitivojn kaj sonbendojn.

BULTENO : 260 ekzempleroj estas presataj kaj 207 sendataj al Normandaj Esperantistoj 11 al diversaj asocioj en Normandio, 31 al E^o-Asocioj en Francio kaj 14 por la Leŝa de-pono. La pasinta numero havis teknikan malperfektaĵon sur la 2a paĝo. La anonco de la Zamenhof-Tago nepre devos ŝperi en la venonta numero. Sro LEMARCHAND ĉesos zorgi pri la bulteno ek de venonta januaro. Li tamen zorgos pri la sendado. Eble Sro GIBAUD tajpos la stencilojn se neniu alia povos fari tion, kaj Sro CIERRE presos. Skribasino estas dezirinda, ĉar tiu de Sro GUERRE fariĝas malnova. Sro LÉLOGEAIS pripensas la eblecon redakti kaj tajpi la stencilojn. Do, solvado de tiu problemo prokrastita ĝis la venontaj estrarkunvenoj.

DIVERSAĴOJ : Sro TEXIER, el LERBY deziras renkonti spertajn Esperantistojn por diskuti kun ili pri la disvastigo de Esperanto.

VENONTA KUNVENO : Ĝi okazos la 4an de decembro 76a je la 14a horo en la Ruan Junulgastejo rue Diderot.

Pino de la kunveno : je la 18a horo.

Protokolis : Sro POTTIER.

NIA VIVO EN ...

LE HAYRE

KONATAJ KUNVENOJ : 26.06 : Tiam okazis la lasta kunveno antaŭ la libertempa periodo. Ĝi foje pri labora kunsido kun celo prepari la akcenton de la Sotanoj...

10.09 : "La katastrofa strofo" kiel estus dirita la karmemora Raymond Schwartz : pro strikoj efektivigotaj de la britaj maristoj, la alveno de niaj amikoj estas nuligata "Malĝojo premas la du Grupojn ambaŭflanke de la marbalo..."

18.09 : Dum tiu unua grupkunveno post la libertempo, ĉiu kompren-eble babilis, rakontis pri siaj ferioj ; sed la ĉefa punkto estis la demando pri la vizito de la Sotanoj. Ni dankas sincere al ĉiuj kiuj kontribuis en la organizado de tiu evento, alla multaj personoj kiuj sendis salutaĵojn ĝi okaze, kaj foje ankaŭ donacojn ... Ni aparte pardonpetas al tiuj kiuj sin anoncis kaj rezervis la daton por viziti kaj apogi nin : vi konsciu ke tiu misevento okazis "ekster nia povo". Tamen, nenio estas nuligita, nur la aranĝoj prokrastigitaj ! Ku ! Ĝis pli malfrua dato, verŝajne dum Printempo. !

ĜENERALA KUNVENO : Atentu ! Ĝi okazos je la 16a de oktobro, je la 17a horo ĉe François 1^o. Nepre venu mulnombraj kaj partoprenu en la balotado : kampaĵo jam malfermita !

Sro GIBAUD

YVETOT

Kunveno okazis la 6an de oktobro en la Junu domo por decidi pri la tagoj kaj horoj de la kursoj

La kurso por komencantoj okazos lunde je la 16a horo (aŭ eble je la 20h30) kaj la 2a grada kurso okazos vendrede je la 16a horo ek de la 15a de okto-

-bro. La ĝenerala kunveno okazos dum oktobro aŭ komence de novembro je dato ankoraŭ ne fiksita.

Sro POTTIER

DEAUVILLE TROUVILLE

Sub la prizorgado de Sro TALPIEL, la esperantistoj de PROVILLE kaj najbaraj urboj kunigis la 13an de junio. Pro la necerteco de la vetero kaj per ebliki al

la malfruantoj nin retrovi, ni piknike tagmanĝis en la lerneja manĝejo de DOUQUES. Posttagmeze ni aliris la proksiman arbaron kaj tropenadis laŭ la ombraj padoj. Ni momente haltis sur la teraso de la aerodromo Saint Gatien por risardi la evoluadon de la aviadiloj Ĉirkaŭ la 17a, ni ripozis sur antaŭtastejo en La Croix Sorret kie estis ĉiŝiĝo. Partoprenis dek kvin personoj el MOULIER, LISIEUX, LIVAROT, PROVILLE.

Sro MARTIN.

LISEUX

Preŝdata anekdoto reliefigas la mil kaj unu milonon, kaj grandajn, s'rvajn kiujn povas havi Esperanto.

Iu Sinjorino en EXETER posedas alvararon kiu bildigas antaŭan konstruaĵon tiel ofta en la Devon'a aruflando kiel en nia Normandia provinco; do nia sinjorino suocis ke tiu domo situis en Exeter, sed ĉiuj ŝiaj estis par-te detruita dum la lasta milito, ŝi ne povis ĝin lokigi. Estas vere de la konstruaĵo sur-portas, sur la suba maldekstra angulo la daton : oktobro 1900 kaj la nomon : LISEUX, sed nia simplanimulino kredis ke temis pri la nomo de la pentristo.

Por sin certigi, ŝi aroigis kopion de sia alvararo en la loka ĵurnalo, esperante ke iu leganto povos ŝin informi.

Exeter'a Esperantisto Sro KENNETH Mc LETHAN sin turnis al Sro MARTIN en LISEUX, al kiu li sendis la ĵurnalan artikolon kun ŝia traduko. Ŝi tuj estis solvo de la enigma, dank'al Gesinjoroj RAUIT, denaskaj Lekzovianoj kiu situis senpente la bildon. Sro RAUIT retrovis samvolan poŝtkarton, kiu reprezentis la konstruaĵon: Sro MARTIN aldonis raporteton pri LISEUX kaj Sro KENNETH Mc LETHAN transdonis al la ĵurnalo "EXPRESS and ECHO" kiu informis ke la problemo estis solvita dank'al Esperanto.

Sro MARTIN.

CAEN

La 8an de aprilo 76 en CAEN, 8 esperantis-toj el la urbo kaj tujaj apuduloj kunve-

nis en krea asembleo de "Association Caennaise pour l'Espéranto."

La statutoj de la nova asocio estis transdonitaj al la Prefektejo de Calvados, kaj la Oficiala Ĵurnalo de la Franca Respubliko en sia n°165 de la 17a de julio 76a menciis tiun naskiĝon.

La asocio kunvenis la 16an de septem-bro, kaj decidis lanĉi publikan kurson de E^o en CAEN la 7an de okto-bro.

Sro ROUSSEAU

BUENA REGIONO

Komence de aŭgusto, Gesoj LOISEL akceptis dum du tagoj Hungarinojn kiuj tranoktis en Rouen post voja-ĝo en Britio.

Estis okazo por mal-randa sed tre ŝatata kunveno de la grupanoj, kiuj tiam ne feriis.


Dank'al la afableco de niaj geami-koj LOISEL, tiu vespero estis interesplena pro la interŝanĝoj de ideoj kaj informoj pri la vivo en tiuj malsimilaj landoj.

Ni Funebros

Ni ĵus ricevis informon pri la kruela perdo ne nur por la Normandaj Esperantistoj, sed ankau por la tuta Esperanto - movado : nia fervora amiko kaj Honorprezidanto Sinjoro Marcel ROSC forpasis fine de septembro.

Tiu informo konsternos ĉiujn niajn gesamideanojn. Nia amiko Marcel ROSC estis unu el la plej agemaj pioniroj de la esperanto movado en nia regiono, kaj instiganto de la fondiĝo

ARTIKOLO el "L'AVOIX DU BOCAGE"
25/6/76 de Sro LEGRET - VIRE



Beaucoup de personnes s'imaginent que l'espéranto est une langue uniquement pratique, une valeur littéraire. C'est là une idée fautive qu'il convient de réfuter à l'aide d'exemples tirés de la littérature espérantiste, de traduction et originale.

La tres importante biblioteko de la Londona Esperantista Biblioteko de Londono kompreneble estas la plej granda de la mondo. Ĝi enhavas pli ol ducent milojn da verkoj, kiuj ne nur estas de granda valoro por la scienco, sed ankaŭ por la literaturo. La tradukoj estas tre nombrosaj, en partikularo la grandaj verkoj, en partikularo la verkoj de Molière, Balzac, Dante, Dickens, Schiller, Andersen, etc., ankaŭ de nombrosaj antologioj naciaj. La tradukoj permesas konosci en partikularo la literaturojn de malgrandaj landoj, kiuj estas ofte ignorataj: Finnlando, Pollando, Rumanio, Nederlando. Fakte ĝenerale per unu kompato de la aŭtoro, ĉiuj tradukoj estas tre fidelaj. L'espéranto povas do esti modela sur la konstruaĵoj de frazoj de ĉiuj lingvoj, ĉiuj lingvoj antikvaj. Kofman a, per ekzemplo, tradukis la unuan kanto de la Iljado en respektado de la metriko de la originala antikva. La tradukoj de Georges Dandin et de Knock (Jules Romains) estas egale rimarkindaj.

La literaturo originala estas tute ankaŭ riĉa. Je ne citueroj ke

« Comme l'eau de la rivière », « Anni et Montmartre », deux très bons romans du Français R. Schwartz qui caractérisent l'humour et la virtuosité verbale, les nouvelles futuristes du Hongrois S. Szathmari, « Le Monde des Machines » (les machines finissent par se débarrasser des hommes), les nouvelles domestiques de l'Anglais M. Boulton, la grand et beau poème de l'Ecosais W. Aud « La Race ELnfantine », les charmantes poésies du Danois P. Thorsen « Roses et Tortues », le roman exotique et plein d'humour du Français J. Ribillard « Vie et Opinions de Maître M'Saud ».

L'académicien Georges Duhamel ne doutait pas de la valeur littéraire de l'espéranto puisqu'il a déclaré : « Je crois que l'espéranto pourrait donner un jour lieu à des œuvres exceptionnelles et qui seraient destinées à un grand public divers ».

Langue littéraire, l'espéranto est, par ailleurs, simple, neutre et permet l'intercompréhension au premier contact. Il offre par conséquent une solution parfaite au problème de la langue internationale (européenne).

Pour tous renseignements sur l'espéranto, s'adresser à M. LEGRET A., 14 rue des Sablonnières, Vire, ou à l'Union Française pour l'Espéranto, 4 bis, rue de la Carisai e Paris (4ème).

.....

de nia asocio. Niajn kondolencojn bonvoje ricevi Sinjorino ECSC, kaj la tuta familio. Nekrologa artikolo aperos en la venonta numero de A.E.B.

GRAND QUEVILLY

Por la venonta kurso - periodo
Sro GUILLAUD kaj la loka grupo
planas organizi Esperanto-kurson
por komencantoj.

Tre versajne ekspozicio pri la esperantista kulturo : periodaĵoj, libroj ktp... estos baldaŭ prezentata en salono de la urbo. Artikolo por instigi estontajn aliĝantojn, jam estas preta por aperigi ĝin en la venonta eldono de la loka senpaga gazeto : "Le Signal".

Dekstre estas artikolo kiu
aperis en la sama informageto
"Le Signal"

ESPERANTO ET JUMELAGE

Le 15 avril, la section Espéranto de l'Amicale Bastié Calmette Salengro a eu le plaisir de recevoir un jeune britannique, M. Hilary Chapman, professeur de langue française et allemande à Hinckley, ville anglaise jumelée avec Grand-Quevilly. M. Chapman accompagnait un groupe de ses élèves anglais effectuant un séjour linguistique dans le cadre des échanges scolaires. Il a participé à la réunion de la section. Grâce à la langue internationale, nous avons pu échanger des idées sur nos coutumes, l'instruction et la vie de nos groupes espéranto.

M. Chapman, bien que professeur de langue française, exprime ses idées beaucoup plus aisément en En-

peranto que dans notre langue. Il nous a demandé de faire paraître, l'annonce suivante :

En raison du jumelage de Hinckley avec Grand Querilly, les utilisateurs de la langue Espéranto à Hinckley aimeraient correspondre avec des nor-mands pratiquant l'Espéranto.

Envoyez vos noms et adresses à Sro
Hilary Chapman 7 Fairacre Road
Barwell Leicester, LE9 8HH Grande
Bretagne.

Les personnes désirant apprendre la langue internationale peuvent écrire au Signal

LE SIGNAL

N°31 Juin 1976

Jaraj Kotizoj

La nova jaro venide alproksimiĝas !
Jen estas heliloj el la jara botizo de la diversaj
Esperanto - Asocioj. Alia listo aperos en la decembra
numero de E.S.A.

Bonvolu komuniki al ni la listojn de la asociaj kotizoj kiujn vi ne leŝos ĉi suĉe. Antaŭdankinde !

1 UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO :

Peranto por Francio : UNIGO FRANCA POR ESPERANTO, 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris
Tel.: 278 68 86. C.C.F. 855 35 Paris.

- | | | | |
|---------------------------------------|---|----------|--------------------------------|
| - Individua membro + Jarlibro | : | 37,00 Fr | (gis 25 j. + Kontakto.) |
| - d° + Esperanto revuo | : | 92,00 Fr | d° |
| - Simpla abono al "Esperanto" | : | 55,00 Fr | |
| - d° al "Kontakto." | : | 28,00 Fr | |
| - Abono al La Monda Literara Problemo | : | 55,00 Fr | por unu volumo (3 kalendaroj). |
| - Abono al "Esperanto Dokumentoj" | : | 46,00 Fr | por 10 numeroj. |
| - Abono al "U.N. kadri" | : | 37,00 Fr | por 10 numeroj. |

Regiona Peranto : FEDERATION NORMANDE des CENTRES CULTURELS ESPERANTO. C.C.P. ROUEN 2348 06 C.

2 FEDERATION ESPERANTISTE du TRAVAIL :

179 rue Ordener 75018 Paris. C.C.F. 902-52 P PARIS.

- Abono al "Le Travailleur Socialiste" (sans adhésion à F.E.P.) : 15,00 F.
- Alio al F.E.T : subsc. : 50,00 F. simpla : 10,00 F.
- abono al "Paco" (organo de la Movencia Socialista Movado) : 20,00 F.

3 FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO (Filio de I.E.U.E.)

Association Catholique Française pour l'Espéranto : C.C.P. ROUEN 2324 93 N.

- | | |
|---|-------------|
| - Aliĝo al A.C.F.E. + "Franca Katolika Esperantisto" | : 10,00 Fr |
| - (D ^o - infanoj malpli ol 15 jaraĵ, sacerdotoj, religii(in)oĵ | : 5,00 Fr |
| - Membro bonfaranto : 50,00 Fr - Durviva membro | : 200,00 Fr |

Peranto R; DEGRELLIE, C.C.P. NANCY 714 95 F.

- | | | |
|------------------------------|---|----------|
| - IKUE kun "Espero Katolika" | : | 27,00 Fr |
| - IKI kun "Vojo, Vero, Vajo" | : | 5,00 Fr |

Peranto G. BAUDRY, C.C.P. LILLE 4704 45.

- Abono al "Biblia Revue" : 30,00 Fr

$$+0+0-0+0+0+0+0+0+0+0+0+0-$$

LA PONTEGO DE TANCARVILLE

(SEKVO)

.../... ANKRUM-MASIVAĴOJ. La pend-spanoj okazigas ĉe la elportantaj kablegoj egajn tiradojn nuligatajn en ankrum-masivaĵoj je tiu ekstremo.


1^o - sur la dekstra bordo : oni uzis post-enŝprucigo de cemento en la naturajn fendaĵojn, la klif-mason fosante en tiu ĉi du galeriojn klinitajn laŭ la direkto de la kablegoj 50 m. profunde, tiuj galerioj estis kunigitaj per trabo 32 m. longa kaj 10 m. alta kie estis dronitaj la kabl-fiksiloj.

2^o - sur la maldekstra bordo : la problemo estis pli kompleksa tial ke oni ne trovis firman grundon antaŭ 23 m. de profundo.

Sur kestego, lokita kiel jam ni indikis antaŭe (ĝi estas pli granda ol la Triumfarko de Parizo), oni konstruis gigantan kompensmason el armita betono peza je 35.000 tunoj.

Tiu ĉi maso oscilas per la eĝoj de du fostegoj 4,20 m. dikaj, sur la fundamentaĵo ; oni povas facile kompreni la premoj ĉe la kontakt-punktoj estas egaj, kaj la feraĵumo en tiuj ĉi zonoj estis speciale zorgita.

PILIEROJ. 123 m. altaj. Kiel antaŭe la granda problemo kuŝis sur la maldrekstra bordo. Por ne okazigi malfruon en la laboro, (pro limtempo), la uzita procedo konsistis el komenco de la starigo de la piliero sur la fundamento antaŭ ol tiu ĉi estis finita, antaŭ ol la lokigo de la kestego estis finita; la descendo de la kestegoj ne ĉiam okazas firmekvilibre. Por eviti tion, la subtenanta ŝtonplato estis muntita sur hidraŭlikaj leviloj kies levkapablo estis 15.000 tunoj. Tiele eblis restarigi la pilieron post stabilo de ĝia fundamento.



LA ĈEFAJ KABLEGOJ. Diametro : 60 cm, pezo 1400 Kg po metro proksimume. Ili konsistas el 60 elementaj kabloj : 72 mm. diametre, formitaj el ŝtal-dratoj.

Tiuj ĉi 60 kabloj 1070 m. longaj, pezas po tiu 26 tunojn.

La surlokigo de tiuj kabloj (120) okazis sen kontraŭaĵeto en la daŭro de 3 monatoj. La fiksado ĉe ankrum-masaĵo estas farita dank'al stangoj po 3 por ĉiu elementa kablo 66 mm. diametraj kaj 16 m. longaj, endronitaj en la betono. Ŝtal-lado alfiksitaj al kablego estas fiksitaj per bolto sur 3 stangoj.

Sume, port-kabloj kaj subtenaj dratoj utiligis 24.000 km da ŝtal-dratoj 4,7 mm. diametraj.

MONDRE : La konstruad-tempo estis 44 monatoj. Komencita la 15an de novembro 1955, la inaŭguro estis fiksitaj la 14an de julio 1959. La "Seine" ofte elbordi- ĝis kaj vintroj estis frostegaj (spite al tio, betono ĉiam fluadis; ĝi estis varmigita per akvo, kaj la akvo nem ricevis produktaĵojn kiuj mallevis ĝian frost-temperaturon sen ĝeni la kvaliton; la ĉarpent-envolvaĵoj estis varmigita per "vitrolanaĵo".

Post, el tiu ĉi rimarkinda laborego, la uzo de la pontego ne okazis la 14an de julio, sed... la 1an de julio !

Oni antaŭpovis ĝin per 60 ŝarĝaŭtomobiloj (entute 1.000 tunoj).

Ĝi estis akceptita " bona por la uzo ", kaj de tiu dato, ĉiutage, ĉiuj ajn veturiloj uzas ĝin kontraŭ traira depago. Sed spite tion, la uzanto ĝuas sekuron, belan vidaĵon el la ponto kaj... por la plej nombraj, pli mallongan vojon.

NOTINDAĴO : NEIU grava akcidento ĉiam okazis dum la konstruado !

Komo k PoGo .

NE FORGESU
VIAN JARAN

KOTIZON AL
U.N.E.

5,00


MINIMUNE.

DANKON !

C.C.P.

ROVEN
283 40 H

La sendaksoj
denove plialtiĝis!!
ve!!



ZAMENHOFU RENKONTIĜO

Same kiel lastjare, kiam ni kunvenis en St Valéry en Caux, la Normandaj Esperantistoj kunvenos por digne, sed en ĝoja kaj simpatia etoso, festi la naskiĝan datrevenon de Dro Zamenhof, iniciatinto de la Internacia Lingvo.

Santempe la Franca sekcio de TEJO : Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO) organizos sian decembran renkontiĝon en ROUEN.

Memkompreneble, tiu semajnfino estos malfermata al ĉiuj esperantist(in)oj, ĉu membroj de esperantistaj asocioj, aŭ ne.

Tiu finsemajna kunveno okazos en la Junulgastejo (Auberge de Jeunesse) de ROUEN (76), la 11 / 12 an de decembro, laŭ la jena programo.

- SABATON la 11an de DECEMBRO.

- ek de la 14h. : Akcepto de la partoprenantoj.

Pieda promenado tra la urbo (Se la vetero permesas tion).

Vizito de muzeo.

Diskutoj pri la estontaj planoj de U.N.E.

Kunvenoj de JEFO kaj de la gejunuloj.

Ludoj - Kantoj. - Aŭdado de E° diskoj.

Ekspozicio pri E° gazetaro + libroj.

- vespermanĝo.

- varia vespero.: Ludoj - Kantoj - Prelegetoj.

Teatraĵeto.

Prezentado de E° parolantaj filmoj.

Krespa kaj danca vespero ...ĝis matene !

- DIMANĈON la 12an de DECEMBRO.

- ek de la 10h. : Prelegetoj

Diskutoj Kantoj.

- komuna tagmanĝo.

- amuza posttagmanĝo Kunvenoj de JEFO.

Prezentado de lumbildoj - Sonbendoj - Diskoj.

Disiĝo fine de la posttagmezo ĉikau kafo-taso.

PROGRAMO

ROUEN

1976

ALIĜILO

NOMO :

ANTAŬNOMO :

ADRESO :

Bonvolu ☒ en la taŭga loko ! Dankon !

DATO de ALVENO

Mi venos sola

☐

Mi venos kun alia(j) persono(j)

☐

Nombro da personoj :

☐
☐

1)- Mi alvenos sabate posttagmeze aŭ vespere.

☐

Mi tranoktos en la Junulgastejo. Nombro da personoj..... :

☐
☐

Mi ĉeestos la kunvenon, sed revenos hejmen por tranokti aŭ loĝos en hotelo.

☐

2)- Mi alvenos nur dimanĉe matene

☐

Mi deziras partopreni simplan tagmanĝon dimanĉe por : ☐ personoj.

DISTRA VESPERO

Mi intencas kanti, diri poemojn aŭ rakontojn.

☐

Mi intencas organizi ludojn aŭ teatraĵojn.

☐

Mi montros lumbildojn aŭ filmojn.

☐
☐

Aliaj sugestoj :.....

☐

Mi deziras vespermanĝi sabate en la memserva restoracio de la Junuldomo.

for

☐

personoj

Ni konsilas al vi, fari kopion de tiu ĉi aliĝilo kaj kalkulo, kaj ĝin konservi.

DATO :

SUBSKRIBO :

KELKAJ PLIAJ INFORMOJ :

- ROUEN estas facile atingebla, ĉu aŭtomobile aŭ trajne, ĉu ŝipe aŭ aviadile !

- * - VESPER-MANGO SABATE : i) eblas surloke kuiru manĝaĵojn per gasaparatoj de la Junulgastejo : oni nem devas prizorgi tion, estas manĝilaroj, kaseroloj.....
- ii) alia solvo : 400 metroj for de la Junulgastejo situas menserva restoracio de la Junuldomo de Rouen. Tie oni povas manĝi je malalta prezo. Bonvolu anonci vin antaŭe.
- iii) Aŭ fine, vi mem elektu restoracion en la ĉirkaŭaĵoj.


- * - TRANOKTADO : i) En la Junulgastejo : komunaj dormejoj 6/8 litoj. Bonvolu kunporti litukojojn aŭ dormsakon. Tamen oni povas lui surloke dormsakon je 3,00 fr po nokto. Estas en nia kunvenejo multaj litkovriloj. La tuta domo estas varmigita, havas varmajn duŝojn kaj akvon.
- ii) Vi povos kompreneble elekti se vi deziras dormĉambron en unu el la multnombraj hoteloj de ROUEN. Sed oni nepre mem prizorgu tion.
- iii) Alia eblecosub unu el la kvin pontoj de ROUEN : ne necesas rezervi dormlokon tie je tiu periodo.

- * - DIMANĈA TAGMANĜO : Estos kiel kutime dum la Renkontiĝoj de U.N.E., simpla sed bongusta tagmanĝo en simpatia etoso.

- * - DIVERSAĴOJ : - Bonvolu kunporti kantlibrojn, muzikinstrumentojn kaj bonhumoron.
- El la stacidomo (dekstra riverbordo) vi povas kapti la aŭtobuson n° 12, rekte ĝis la haltejo "Rue DIDEROT" (maldekstra riverbordo), 100 m. for de nia kunvenejo.
- Dum la tuta kunveno okazos en la Junulgastejo, ekspozicio pri esperanto-libroj, gazetoj kaj diversaj E° dokumentoj.
- La Ruena Junulgastejo estas unu el la plej modernaj el Francio. Ĝi povas akcepti 130 personojn samtempe. Ĝi situas en kvietaj strato apude de la maldekstra riverborda urbo centro.

Do, venu
multnombraj,
ni atendas vin
en la Junulgastejo
de Rouen
17 Rue Diderot

Sabaton la Man Ĥaj
Dimanĉon la 13an de Decembro 1976a



Bonvolu detranĉi aŭ rekopii Ĥaj sendi Ĥiel plej eble plej frue Ĥaj antaŭ la 1a de decembro

Resendu la aliĝilon al :

Pierre LEMARCHAND
43 rue Desseaux
76100 ROUEN.

kune kun la antaŭpago. Dankon !

ANTAŬPAGO : Kiu aliĝas, tiu antaŭpagu la tuton. En okazo de lastminuta nepartopreno la kasisto repagos al vi, escepte de la aliĝkotizoj.

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE : C.C.P. ROUEN
283 40 H.

Mi sendas Ĥi kune bankĉekon aŭ poŝtĉekon de : fr

Por :	Aliĝo	: 6,00		
* 1)	Komuna tagmanĝo dimanĉe	: 15,00	= 24,00 fr	x
	uzo de la ekipaĵoj de la Junuldomo	: 3,00		=
	aŭ			
* 2)	Aliĝo	: 6,00		
	Komuna tagmanĝo dimanĉe	: 15,00	= 32,00 fr	x
	Tranoktado en la Junul- -gastejo	: 11,00		=
3)	Kiel "1", por geedzoj		= 45,00 fr	=
4)	Kiel "2", por geedzoj (Tranoktado en la Junuldomo)		= 60,00 fr	=
5)	Kiel "1" por infano malpli ol 15 j.		= 20,00 fr	x
6)	Kiel "2" por infano malpli ol 15 j. (kun tranoktado)		= 28,00 fr	x
	SUME :			=

SUME :

DANKON!
KONTAKTIZOJ
ĤIAM BONVENAJ